# Bona Espero

**Cirkulero 64**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.** **Juli 2005**
prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein
☏ +49-(0)2902-57460 ★ 🖷 +49-(0)2902-911323 ★ 🖳 u. nelken@t-online. de

*Karaj geamikoj kaj subtenantoj,*

*bedaŭrinde pro diversmanieraj gravaj problemoj mi ne sukcesis pretigi la nunan rondleteron pli frue. La informoj pri Bona Espero estis senditaj de Ursula al ni jam en majo. Sed certe vi tamen ĝojas povi legi la novaĵojn el Brazilo ankaŭ nur nun: Ĉi tie do la raporto de Ursula Grattapaglia:*

„Karaj amikoj, finiĝis la pluv-sezono precipe intensa ĉi-jare, sed la naturo estas ankoraŭ brile verda kiel cetere nia espero en eĉ pli bona estonteco.


Infanoj post la rikolto de beroj

Vi volas havi novaĵojn, bonajn novaĵojn de sukcesoj, sed nia laboro ĉiutaga ja estas rutina kaj laŭeble trankvila tempo por lernado. Ni ĉiam klopodas ne havi problemojn, kio malfacilas pro la fakto ke ni vivas kun infanoj kaj gejunuloj kelkfoje el situacio da alta socia risko kun la relativaj emociaj problemoj. Tamen la lastaj monatoj estis escepte harmoniaj kaj la novaj infanoj bonege adaptiĝis.

El nia 14a paralelo sude de Ekvatoro jen niaj por vi eventuale novaj informoj:

**Volontuloj** – Foriris Mathias el Danlando, Hirojuki el Japanujo kaj Lautica Tzusch el Germanio; alvenis Sanoza el ĉinio kaj Corrado el Italio. Sanoza estas ĉarma fru-emerita sinjorino kiu dum la UK en Pekino esprimis la deziron restadi en Bona Espero por kunlabori kaj pliperfektiĝi en Esperanto. La problemo estis kiel havigi al ŝi la brazilan vizon, ĉar brazilanoj, kontraŭe al eŭropanoj, ankoraŭ timas la invadon de ĉinoj kaj malfaciligas la liveron de enir-vizoj. Sed la anĝeloj de Bona Espero estas tre helpemaj kaj ili sendis al ni malnovan amikon, brazila ambasadoro, nuntempe elstara funkciulo en la eksterlanda ministerio, kiu per simpla elektronika mesaĝo al la brazila

ambasado en Pekino, havigis al Sanoza unujaran vizon ! Nun ŝi estas ĉi tie, instruas Tai Chi al la infanoj, helpas en la kuirejo kaj klopodas ( verdire per granda penado) instigi nin ŝati la ĉinan ...kuirarton, kiel ekzemple duonkrudaj terpomoj! Ŝi tamen ne restos unu jaron ĉar ŝi ricevis inviton kaj stipendion por viziti Esperanto kurson en Usono en julio kaj krome ŝia edzo subite perceptis ke li estis tro larĝanima permesi al ŝi tutan jaron da foresto el la hejmo.

Corrado estas juna italo, amiko de amikoj niaj, kiu aŭdis pri Bona Espero, komencis lerni Esperanton kaj decidis volontuli ĉe ni. Li estas bonega kunulo por niaj infanoj, ĉiam helpema kaj vere fariĝis bona akiraĵo por Bona Espero.

**Vizitantoj** – Dum la agrabla vizito de la delegacio de Oomoto, kiu akompanis la spiritan gvidantinon Kurenai, ni akceptis ankaŭ geedzojn Grassini el Italio kiuj jam dufoje ĉeestis en Bona Espero allogitaj de nia etoso. Poste vizitis nin profesoro Ronald Glossop el Usono, aŭtoro de ampleksa verko pri Monda Federacio. Li ankaŭ zorgas pri la projekto " infanoj ĉirkaŭ la mondo".

**La infanoj** – Ho, la infanoj !! Ili estas simple mirindaj kaj bone progresas sur la malfacila vojo de alfabetigo. Lastatempe aperis nova aspekto de nia laboro: Bona Espero estas tiom konata en la urbo, ke infanoj haltigas nin surstrate petante loĝi ĉe ni. Temas vere pri help-krio de etuloj forlasitaj hejme de familianoj tute ne preparitaj por la gepatra misio. Post enketo ĉe tiuj familioj kaj interkonsente kun la urba konsilio pri infanoj kaj adoleskantoj, ni akceptis la taskon zorgi ankaŭ pri Benedito ( 7 jara kiu jam vivis praktike surstrate), kies patrino estas plene dediĉita al la sukerkana brando kaj la patron li ne konas. Multaj aliaj estas en atendo-listo, sed nur post serioza enketado ni decidos akcepti ilin.

**Nova projekto** – Post la kristnaska kaj paska festoj, dum kiuj kunvenis ĉiufoje en Bona Espero pli ol 80 personoj, ĉiam pli evidentiĝas ke ni ne posedas sufiĉe grandan kunvenejon. Ankaŭ la lernejo devus havi pli da spacon je dispono, kaj la nombro de nin vizitantaj ekslernantoj evidente multe kreskis en la pasintaj jaroj.



Japanaj gastoj rimarkis tion kaj lasis mon-donacon por Bona Espero kun la celo helpi en la konstruado de nova lernejo kun granda festsalono. Ankaŭ geedzoj Grassini kontribuis per aĉetado de kelkmiloj da brikoj kaj cemento. Evidente estas nur la komenco de belega projekto por kies realigo ni multe fidas ankaŭ je la helpo de aliaj amikoj. Tamen longan vojon oni plenumas per la unua paŝo kaj sekve ni jam estas fosantaj la fundamenton ( ne de Esperanto !) sed de la nova domo.

**Nia urba sidejo –** Kiam en 1996 ni revis pri domo en Alto Paraiso, la ideo ŝajnis absurde ambicia, sed post 8 jaroj de sia realigo, ĝi aperas pozitive larĝvida. Tiu domo en Avenuo Esperanto, ne nur estas apogo por niaj gejunuloj, kiuj studas kaj laboras en la urbo, sed fariĝis referenc-punkto por multaj sociaj aktivecoj. En ĝi ankaŭ kunvenas la loka Rotaria Klubo de Alto Paraiso, kiu aktive kunlaboras en la evoluo de la urbo. Dufoje semajne vigla grupo de infanoj kaj adoleskantoj lernas Esperanton sub la gvidado de samideano Sergio Campos. Profesiigaj kursoj jam estis tie organizitaj kaj novaj estas planitaj kunlabore kun la registara instanco por profesiiga instruado. La nove elektita urbestro de Alto Paraiso alte taksas nian laboron kaj kune kun la urbaj konsilantoj kunvenis plurfoje en nia urba sidejo por plani novajn projektojn.

**Popola renkontiĝo en la "Chapada dos Veadeiros"** (altebenaĵo de cerv-ĉasistoj) - Pluraj urbetoj situas en la plej alta parto de la brazila centra altebenaĵo kaj ĝuste por konservi la popolajn morojn antaŭ la invado de rok-muziko kaj usonaj banalaĵoj, tiuj urboj organizas ĉiujare popolan festivalon. La infanoj de Bona Espero estis invititaj prezenti originalajn popolajn infandancojn dimanĉe la 8an de majo antaŭ miloj da enloĝantoj de Cavalcante, Colinas, Terezina kaj Alto Paraíso. Instruistino Ada, motoro de tiu projekto, tiel bone trejnis niajn gelernantojn, ke la sukceso brilis en la tuta altebenaĵo!


Tiel estas karaj geamikoj, la vivo en Bona Espero. "Ke la Paco regu la mondon" estas skribite sur nia obelisko kaj ni vere klopodas plenumi tiun devizon.........danke al vi !"

*Ne necesas aldoni ion al ĉi tiu impreza fina frazo!*
*Ĉu ne estas admirinda, kian multspecan kaj impresan kulturan vivon oni prezentas en Bona Espero al la infanoj? Kompreneble estas ĉefe la merito de Ursula kaj Giuseppe kiuj neskueblaj ekde pli ol 30 jaroj majstris ĉiujn taskojn.*
*Sed certe multaj eventoj ne tiel estus okazintaj sen la zorgema preparado kaj organizado fare de Adarci kaj la kunlaboro de multaj precipe brazilaj sed ankaŭ eksterlandanaj helpantoj. Ni sincere dankas al ĉiu de ili.Pro tio ja ankaŭ estas tiel grava ke ĉiam denove Ursula kaj Giuseppe povas instigi junajn kaj maljunajn homojn el la tuta mondo kunhelpi ilin ĉe la edukado de la infanoj aŭ subteni la laboron per aliaj rimedoj.*



*Kaj nun legu la tre personaj spertoj unuafoje de ĉina volontulino:*

"Saluton, karaj esperantistoj, amikoj de Bona Espero!
Mia nomo estas Rao Jian, kiu en Esperanto signifas Sanoza.
Mi lasis en Nanchang, Ĉinio, mian edzon kaj mian filon kun la edzino, por veni al Bona Espero por kelkaj monatoj; unue por oferti mian volontulan laboron kaj due por pliperfektiĝi en la Internacia Lingvo Esperanto. Mi estas bonŝanca, ĉar jam mi povis emeritiĝi kun nur 50 jaroj de la ministerio pri transportoj (mi estis vicdirektoro de grandega trajnstacio) kaj nun mi prepariĝas por lecioni en mia lando Esperanton en la universitato.
Klare, ke mi tre saŭdadas mian familion, sed per la reto mi havas kontakton kaj kun la tempo mi alkutimiĝas al la brazila vivmaniero.



La manĝaĵoj en Brazilo estas tre malsamaj, sed nun mi konsideras tre bongustaj la bonajn pladojn de Bona Espero!

Mi helpas multe en la kuirejo al Lindomar kaj Ady.
Mi instruas al la infanoj nian miljaran gimnastikon Tai Chi kaj la infanoj estas tre ĉarmaj en siaj movoj.
Vespere mi monitoras la hejmtaskojn de la knabinoj, kvankam mi tute ne povas kompreni la portugalan lingvon, sed almenaŭ la matematikon mi povas kontroli....

Mi jam vizitis la kurson en Alto Paraiso, mi vizitis Esperanto-klubojn en Brasilia kaj certe mi povos reiri al mia lando kun pli bona kono de nia amata lingvo.
Mi tre kore salutas vin ĉiujn!
Sanoza"

*Resume ankaŭ ĉi tiu bilanco prezentas denove kialon por ĝojo kaj por iu fiero same por vi kaj viaj kontribuoj, karaj amikoj!*
*Kiel ĉiŭfoje mia kora saluto kaj danko koncernas al vi ĉiuj, sed ne laste por la novaj amikoj en nia rondo. Krome mi petas vin por via plua fideleco kaj sincere deziras al vi bonfarton en ĉiu rilato.*

*Ĝis la venonta fojo!*

Otto Volk